

MAZINGIRA  
P.O KESTO 51, BUNDA. TANZANIO



Retadreso: [sbmramba@yahoo.com](mailto:sbmramba@yahoo.com) , Tel: +255 755 076596  
Retpagoj: [www.kono.be/mazingira/eo](http://www.kono.be/mazingira/eo) , <http://www.verduloj.org/mazingira.htm> , [www.mazingira.nl](http://www.mazingira.nl)

La 9-a de Oktobro 2016-10-09

Karaj Estimataj subtenantoj de Mazingira .

Kun granda estimo kaj ghojo mi sendas al vi chi tiun raporton pri la laboroj faritaj de Mazingira dum la periodo de Oktobro 2015 ghis Septembro 2016.

### **Antaularolo;**

Por chi tiu periodo okazis en Tanzanio la chefa baloto en kiu oni balotis por elekti novajn gvidantojn ,(la prezidanto de la lando, parlamentanoj kaj konsilioj) kiujn gvidos la landon ghis en la jaro 2020. Mi kandidatighis por mia vilagharo KETARE kiu kunighas 4 vilaghojn kiuj entute havas kvanton de pli ol 10,000 loghantojn, dank al la bonfaraj projektoj pere de Mazingira mi estis re-elektita kun multe da vochedonoj por gvidi la vilagharon Ketare ghis 2020.

Mi tutkore dankas al chiuj kiuj subtenis la projektojn de Mazingira dum tio periodo, estis multaj personoj kaj asocio kiuj subtenis al Mazingira, inter ili estas:

D-ro Manfred Westermayer, la Franca asocio Solidareco Afriko-Azio de Boris Bouchez, Bart Demeyere, Bruno kaj Maryvonne Robieneau, Malcolm Jones, Snorre Benum, Ivo Durwael, Kristoforo Feetes, Christiane Lamy, la Nederlanda fonduso [www.mazingira.nl](http://www.mazingira.nl) , la instancoj de unuighinta nacio (UN Evoluiga Programo) UNDP kaj UNESCO , la anoj de la Esperanto-plus ktp ktp. Mi esperas ke viaj bonfaraj subteno al la projektoj de Mazingira pli dauros ankau por la venonta periodo de 2017.

### **Agadraporto 2016;**

#### **Radio projekto;**

UNDP, UN Evoluiga Programo, subtenis nian radiostacion "Mazingira Fm" en la jaro 2016 .Ghis nun la radio elsendas la programojn por la tuta regiono kaj dum la pasintan balot-kampanjo nia radio bone elsendis la programojn kiujn instruis al la auskultantoj pri la vera demokratio kiun ebligis al multaj virinoj estu elektitaj por la posteno de parlamentanoj kaj konsilioj, kaj dauris la elsendo-programoj pri homaj rajtoj kaj pri chesigo de malbonaj tradiciaj pensoj de diversaj triboj en nia regiono, kiuj estis kontrau la rajtoj de virinoj kaj infanoj, pri la edukado de knabinoj kaj chesigo de ina cirkumcido ktp

#### **Operacio de infanoj kun misformigho;**

Multan dankon al D-ro Manfred Westermayer, Bart Demeyere, Christiane Lamy kaj aliaj kiuj subtenis la operaciojn de infanoj kun misformitaj piedoj/brakoj dum tio periodo, mi esperas ke vi pli daurigos la subtenon al tiuj infanoj por 2017, temen per nia radio stacio ni sendis kelkajn programojn en kiuj ni invitis la kuracistoj kiuj atentigis al auskultantoj pri malbona uzo de kinino dum la gravedeco.

#### **Sano :**

En Tanzanio ekzistas shtata san-asekuro kiu kostas 10 euroj por unu familio de 6 personoj dum unu jaro, sed pro malricheco multaj familioj ne povas alighi al tio asekuro, kaj en Ketare vilagharo trovoghas pli ol 400 malrichaj familioj kiuj ne povas pagi por alighi al tio asekuro, do dum la jaro 2016 mi ricevis chirkau 960 euroj de anonimaj donacantoj por helpi al 96 familioj , do ankoraŭ mi petas al vi bonvolu donaci pri tiu projekto en 2017.

#### **Konstruado de malsanulejoj;**

Mi antau dankas al S-ro Manolo Parra de Madrido kaj kiuj subtenis la konstruadon de malsanulejoj en 2016, kiu donacis la sumon de 2500 Euroj por konstrui la akushejon en

Marambeka vilagho ankoraŭ mankas ĉirkau 1100 eŭroj por finkonstrui ĝin , kaj Bart Demayere pagis por operacioj de misformitaj infanoj , Restis ĉirkau 1000 eŭroj kiuj mi elspezis por konstruado de la muro ĉe Malsanulejo de Tiring'ati vilagho (pri tiuj du malsanulejoj mi jam sendis la fotojn) do mi esperas ke vi Manolo Parra kaj Bart klopodos kolekti pli da mono por fin-konstrui tiuj 2 projektoj.

### **Akvo & puto projekto;**

Koran dankon al la Franca asocio Solidareco Afriko Azio kiu daŭris subteni la projekton en 2016 ni sukcesis konstrui 6 putojn kaj 1 akvo-rezervujo ĉe Bigegu bazlernejo, mi plu petas al la Franca Asocio de Boris Bouchez daŭrigi la subtenon ankau por la jaro 2017 por ke ni konstrui 1 puton kaj 3 akvo rezervujoj ĉe Esperanto Mezlernejo, Tiring'ati bazlernejo kaj Nyaburundu baz-lernejo .

Ni ricevis por la pluvakvo-baseno en Nyaburundo organizita de AVE 6000 Euroj de germana WKV AG kaj 400 de AVE-anoj, kaj ni komencos la konstruado baldau.

Krome ni petas ĉirkau 7500 Euroj por konstrui 1 pluv-akvo baseno en Marambeka vilagho, kaj poste ni daŭros konstrui la samajn basenojn en Bigegu kaj Tiring'ati vilaghoj kaj al aliaj vilaghoj de Salama vilagharoj por la venontaj jaroj.

### **Orfo-projekto;**

La nov-elektita prezidanto de nia lando forigis lerno-pagoj por lernantoj en shtataj lernejoj, pro tio la nombro de subtenitaj orfoj de Mazingira kreskis al 474 en 2016 ,inter ili ĉirkau 48 orfoj ricevis helpon de Germanio, Nederlando, Belgio ktp kaj 426 ricevis helpon de Francio pere de la Franca asocio Solidareco Afrika-Azio de Boris Bouchez kaj Maryvonne Robienau. Mi kore petas vin daŭrigu vian subtenon denove por la jaro 2017 .

### **Lernejo projekto;**

Tre bone daŭris la konstruado de Esperanto mez-lernejo ankau en 2016, mi dankas al niaj Nederlandaj samideanoj [www.mazingira.nl](http://www.mazingira.nl) kiuj subtenis la konstruado de 3 sciencaj klas-chambroj kaj 3 instruistaj loghejoj per ĉirkau 50,000 eŭroj , mi esperas ke ili pli daŭros subteni la konstruado de loghejo por lernantinoj ĉar dum ĉi tiu jaro ĉirkau 6 knabinoj gravedighis kaj kelkaj devis forlasi la lernejon pro longa vojagho iri ka reveni hejme chiutage. Mi ankau dankas al S-ro Snorre Benum kun siaj gefratoj kiuj kolektis monon monon por 1 instuista loghejo kaj mebloj.

Por la la venonta jaro 2017 espereble Esperanto mez-lernejo havos pli ol 300 lernantojn do okazos grandan manko de klas-chambroj ĉar ĝis nun ekzistas nur 6 klas-chambroj, pro tio mi daŭre petas vin kontribui por tio kaj por konstruadoj de pliaj instruistaj loghejoj, bibliotekon kaj por pluv-akvo rezervujoj.mi instruas esperanton en tiu lernejo.

### **Mikrokreditoj;**

Per tiu projekto multaj virinoj vere profitis/as pruntepreni monon por starigi/ daŭrigi siajn malgrandajn projektojn pri agrikultivado kaj bredado da kokinoj kaj bestoj kelkaj virinoj jam sukcesis konstrui loghejojn pere de tiu projekto kaj ili povis ankau pagi por san asekuro kaj pagi por lernokostoj por iliaj infanoj.

### **Arbarigho;**

Ni semis 1000, sed pro la suno kreskis 400 arbidoj kiujn ni daŭre disdonis al lernejoj kaj al kelkaj familioj. En 2017 ni planos kreskigi pliajn arbidojn kelkaj kun fruktojn.

### **Esperanto kurso:**

Ni dankas la daŭran subtenon flanke de la fonduso "Esperanto-plus" kiu subtenis/as la instruado de Esperanto al lernantoj en la Esperanto mezlernejo.

Lernantoj de la unua jaro ĝis la kvara jaro partoprenis la lernadon de Esperanto kaj bone lernis la lingvon. Ankau mi instruis la lingvon al instruistoj kaj ĵurnalistojn.

Mi esperas ke kelkaj de ili partoprenos al la 6-an Afrikan Kongreson de Esperanto se ili sukcesos pagi la aligh-kotizon de 10 Euroj, loghadon kaj manghoj dum la kongreso kiu okazos dum la 24-a - 31-a de Decembro en Bunda; pli: [esperanto-afriko.org](http://esperanto-afriko.org)

Koran dankon,

**Mramba Simba Nyamkinda**